

Raporto pri la lunda kunveno de la 3a de septembro 2007 : vaŭda kreo de esperanta filmeto

Francisko Randin perkomputile vidigis al ĉirkaŭ 15 ĉeestantoj kelkajn el siaj filmoj, kiujn ĉiuj povas vidi ĉe <http://www.youtube.com/DannirLsne>

Li invitis la interesatojn ludi rolojn en nova filmeto. Andres proponis temon pri la nunaj fifamaj ŝafaj aŭfiŝoj, kiuj vidiĝas en Laŭzano. Do,

oni proponis scenojn de kvereloj, bataloj pri fremduloj. Tio instigis la ludantojn multe paroli, inventi dialogojn. Sed ŝajnas, ke la LES ne politikumos sur la reto. Post cerbumado, pli saĝa filmo turniĝos – dialogoj inter personoj el diversaj nacioj, am-afereto, vizito de belaj kvartaloj de Laŭzano.

Do, iru baldaŭ sur la reton por malkovri tiun specialaĵon !

Elisabeth

Kalendaro 2007

- 01/10/07 Claude Gacond raportos pri Svisa Radio Internacia (*)
- 05/11/07 Diskutoj pri plursencaj vortoj (Daniel) (*)
- Sa** 15/12/07 Zamenhofa Festo (sabate !!)

(*): en la stacidomo de Laŭzano ĉe la unua etaĝo, super « La Bufedo » je la 20-a

Ne forgesu, ke la Informilo estas **via ilo**. Dankon pro sendado al ni de viaj originalaj artikoloj, antaŭ la 10-a de oktobro. La redakcio

Laŭzana Esperanto-Societo

Société Lausannoise d'Espéranto

Poŝtfako - Case postale 246 * CH - 1000 LAUSANNE 22

+41 (0)76 411 14 55 * +41 (0)21 657 14 56

esperanto@isuisse.com <http://www.esperanto.ch/Lausanne>

Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

**Lunde la 1-an de oktobro 2007
ĉe la unua etaĝo de la stacidoma bufedo**

Claude Gacond

raportos pri 30 jaroj de por-esperanta kronikado ĉe Svisa Radio Internacia (1962-1992).

Liaj tiamaj radioprelegoj nun reaŭdeblas kaj relegeblas dank'al la reteja miraklo kaj al la efika kunlaboro de Nancy Fontannaz kaj Stefano Keller.

Claude Gacond aŭdigos kaj legigos al ni karakterizajn radioprelegojn kaj ni diskutos pri ilia nuna uzo.

Ce lundi 1er octobre 2007, même les crocodiles écouteront avec plaisir **Claude Gacond** raconter ses 30 ans d'activité de chroniqueur espérantophone à la Radio suisse internationale (1962-1992).

Et, grâce à l'internet, ils découvriront que l'écoute toujours possible de ses causeries est d'un profit réel pour l'apprentissage de l'espéranto.

TEMARO

Renouvellement du comité 2008 (fr)	2
Kaserolaj "Babetbabilaĵoj": Ŝveligitaj fromaĝ-kuketoj (eo)	3
Malkovru la retan esperanton (4) (eo)	4
Kion esperanto postulus de vi : respondo (eo)	6
Staĝo de esperanto en grezijona kastelo (eo)	6
Les langues: un défi (fr)	7
Raporto pri la lunda kunveno de la 3a de septembro 2007 : vaŭda kreo de esperanta filmeto	8

Renouvellement du comité en 2008

Pendant plusieurs années, notre comité n'était pas beaucoup plus qu'une simple idée. A tel point que la LES s'est même vue radiée d'une autre société espérantophone dont elle était membre. Voici deux ans, notre comité binomial devenait un trio, et le voici aujourd'hui quintette.

Tout pourrait s'arrêter à ce jeu de chiffres, si ses membres n'avaient d'autres objectifs qu'une présence mensuelle à une soirée ayant rapport à l'espéranto. Mais voilà, ce rassemblement d'espérantophones aux vues variées a donné naissance à un vivier d'idées qui a pu s'exprimer ces derniers mois à l'occasion de trois longues séances de comité.

Après un long travail de revue de l'historique de notre société, après de longues discussions sur les buts et objectifs de chacun, Dominique (président), Elisabeth, Daniel et Laurent (membres du comité), ont décidé de donner leur énergie à différents projets relatifs à l'espéranto, mais n'ayant pas forcément leur place dans le cadre de LES. Pour cette raison, ils ne se représenteront pas au comité lors de l'assemblée générale de février 2008.

François Randin, quant à lui, après douze ans au service de la société, souhaite être déchargé de la caisse et du secrétariat de manière à pouvoir se consacrer à ses cours et ses films.

Il est donc très important de penser dès maintenant à l'avenir de LES. Nous invitons tous les membres qui souhaiteraient devenir membres du comité à s'annoncer au plus vite à Dominique (021 808 76 43 ou de.demestral@bluewin.ch) afin que la transition puisse se faire de la meilleure manière. Nous vous rendons attentifs au fait qu'au cas où personne ne se présenterait pour prendre la relève, la société serait mise en sommeil lors de la prochaine assemblée générale.

LES komitato

La grezilionaj gevolontuloj estis tre akceptemaj kaj kuiris manĝaĵon bongustan dum la tuta semajno. Kurso de jogo estis organizita ankaŭ por ĉiuj, kiuj interesiĝas.

La regiono tiel agrablas, ke ni biciklis multfoje tra la kamparo apud Baugé. Merkredo estas libera tago, do ni profitis vidi kastelojn "de la Loire". Ni vizitis Azay-le-Rideau kaj Ussé, kie Olivier, bonŝance, renkontis enĝardene la maljunan dukinon, bienulo de la kastelo. Ŝi

rakontis al li, kiel malfacilas okupiĝi pri antikvaĵoj kaj ke ŝia bofilo riĉa monhelpas ŝin multe.

Mi devas ankoraŭ diri, ke Sonia, Marguerite kaj Sylvette iris grezilionen, meze de julio, ferii enkaŝtele.

Interese estas trapasi semajnon nur esperantlingvan en belega ĉirkaŭaĵo kastela. Mi invitas vin iri foje en Grezilionon, ĉar tre agrablas eniri Esperantion.

François Randin

Les langues : un défi

Qui, parmi les espérantophones, n'a pas lu Claude Piron ? Psychologue, ancien traducteur, il est l'un des auteurs les plus prolifiques de notre langue, que ce soit au travers de ses nouvelles, de ses romans policiers, ou de diverses études souvent centrées sur le problème des langues.



*Claude Piron,
dans « Les langues : un défi », 1er épisode*

Récemment, Claude Piron a entrepris la création d'une série de vidéos avec l'aide de François Randin. Grâce à internet et divers sites spécialisés dans la distribution de vidéos en ligne, les dix épisodes de dix minutes de cette série sur le thème des langues sont maintenant disponibles gratuitement, afin de

vous faire réfléchir sur cette problématique qui est le coeur de la motivation espérantophone.

Vous trouverez la liste des épisodes, sur la page : [http:// www.youtube.com/user/DannirLsne](http://www.youtube.com/user/DannirLsne)

Laurent

Kion esperanto postulus de vi : respondo

Responde al la artikolo de Laurent, mi diras :

Se mi estus esperanto, anstataŭ provi konvinki ĉiujn en la mondo, vidante la lingvo-nivelon inter ni, mi dezirus, kiel diris Kabe (Kazimir Bein) : "Ke la esperantistoj mem ellernu esperanton !..." Tiel multe restas al ni por lerni...

Nancy

Staĝo de esperanto en greziona kastelo

Ĉiujare, somere, la geamika asocio de la kastelo de Grezijono organizas staĝojn. Dum unu semajno, la partoprenantoj - germanaj, hispanaj, rusaj, francaj, brazilanaj kaj svisaj - Olivier Bonzon, Françoise Peterman kaj ŝia edzo - povas plibonigi la nivelon de sia povmaniero paroli esperanton per trinivelaj kursoj.

La unua estas speciale proponita al la komencantoj. Tiel dek kursanoj -



Kastelo de Grezijono

kiel Olivier, lernanto mia - sekvas la nuresperantparolantan instruadon donitan de germanino. La unua kurso estas ankaŭ maniero studi per ludo kaj promenado.

En la dua, rusino instruas subtilaĵojn de nia lingvo. Per diversaj tekstoj, la studentoj povas legi kaj resumi, kion ili komprenas.

En la tria, kvin personoj deziris nur ... babiladi inter si. Kiel kutime la francoj akcentaĉas kaj ne volas evoluigi sin. La instruistino rusa proponis korekti la erarojn de la gefrancoj ... kiuj ne konsentis kaj klarigis ilian opinion tiel : "Se iu korektas min, mi ne plu povas babili ... mi tute mutas".

Bonŝance, kelkaj nefrancoj bonparolantaj trovis momenton dum la vespero por paroli kaj por evoluigi nian nivelon. Mi mem ricevis de du francinoj komencantaj la mendon, ĉu mi perlege trejnadigus ilin por : "Neniam akcenti fuŝe" ... ili diris. (Restas espero !)

Kaserolaj « Babetbabilaĵoj »**Ŝveligitaj fromaĝ-kuketoj kun roza pipro**

(Unua plado servita dum la ekskurso 2007)

Pri sufleoj, mi ofte aŭdis : "Mia Dio ! kiam mi alportis miajn sufleojn al miaj gastoj, ili tute malŝvelis. Ili ŝajnis ebenaj omletoj !".

Multaj pensas, ke malfacilas sukcesi baki sufleojn. Veras, ke tradiciaj receptoj faritaj per beŝamelo postulas iom da trejnado.

Sed la recepto, kiun mi proponas al vi, certe sukcesos. Mi ricevis ĝin de vaŭda amiko, kiu mem ricevis ĝin sekrete de sia avino en Gruyères ! Simpla kaj facila !

Kvantoj por 4 personoj

- k.k. = kafkulero / s.k. = supkulero
- 2 dl lakto
- 20 gr.faruno
- 20 gr.butero (iom fandita)
- 3 grandaj ovoj
- 80 gr.raspita fromaĝo (Gruyères, Vacherin aŭ Comté)
- 4 bakbovletoj (diametro : 8 – 8.5 cm)
- 2 k.k. roza pipro pulverigita (vi povas anstataŭigi ĝin per iom da muskata nukso kaj 2 k.k. de timiano)
- 2-3 s.k. nerafinita faruno + iom da butero kaj oleo por ŝmirado

Preparo

Ŝmiru viajn bakbovletojn kun iom da butero kaj metu ilin en fridujon ĝis la butero malvarmiĝos denove sur la parietoj.

Intertempe, en granda bovlo almiksu unu post la aliajn : ovojn, lakton, buteron, raspitan fromaĝon, farunon kaj la rozan pipron. Kirlo bone.

Gustumu la mason kaj eventuale aldonu iom da salo.

Preneu el la fridujo viajn bakujetojn kaj ŝmiru denove la parietojn per iom da sezama aŭ sunflora oleo. Poste superŝutu enen iom da nerafinita faruno (tritiko, spelto aŭ fagopiro) (*blé, épeautre ou sarrasin*). Priatentu, ke ĝi bone gluu sur la interna parto de la bovletoj : tiu ago igos viajn fromaĝkuketojn bele ŝvelitaj kaj kreos maldikan kruston.

Bakado : En varma forno, 200-220 gradoj dum 20-25 minutoj ĝis la sufleoj iĝos orkoloraj.

**Prezentado**

Helpe de tuko por ne bruligi vin, deponu viajn belŝvelitajn fromaĝkuketojn sur telerojn, kiujn vi

akompanos, ekzemple, de freŝa salato de laktuko, eruko kaj kukumo.

Glaso da blanka vino kiel Chasse-las aŭ Chardonnay de nia regiono tre bone subtenos tiujn rozpipritajn sufleojn.

Je via sukceso !

Elisabeth de Mestral

Malkovru la retan esperanton

Kvara parto

Lastmonate, mi skribis pri la eblecoj paroli sur-rete kaj nun mi proponas al vi legi tekstojn trovatajn sur retpaĝoj. Ili estas multaj kaj mi devis elekti nur parton de tiuj vizitendaj paĝoj.

Legi ĉiutage iom da esperanta literaturo estas bona solvo por progresi kaj ni ne devas nepre aĉeti librojn. Eblas trovi kompletajn librojn uzante la komputilon. Oni povas ankaŭ trovi senpagajn novelojn, fabelojn, poemojn, eseojn, ktp. Jen :

Mi komencas per unu el la plej gravaj libroj de nia mondo, tradukita al tiel multaj lingvoj : la Sankta Biblio. Vi povas trovi la tutan tekston sur tiu paĝo : <http://steve-and-pattie.com/esperantujo/biblio/>

Eble vi ne ŝatas legi tekstojn komputile kaj vi preferas presi tiujn surpaperen. La plej bona solvo estas simple elekti muse la tekston, kopii kaj meti ĝin en vian

"tekstprilaborilon" ([traitement de texte](#)). (Mi klarigis kiel fari tion en la unua artikolo de tiu serio.) Poste vi povos facile aranĝi la tekston kiel vi volas kaj presi ĝin.

Tiu libro, la Sankta Biblio, estas praktika ĉar ĝi jam havas la tipajn akcentojn de nia lingvo. Tamen ofte vi trovos tekstojn senakcentajn. Tiam vi devos iomete labori. Se vi ne interesiĝas kiel fari tion, ne legu la sekvan paragrafon.

Unue, vi devas elŝuti la programon EK, kiu permesas skribi facile kun akcentoj. Vi trovos tiun mirindaĵon sur tiu paĝo : <http://www.esperanto.mv.ru/Ek/> Tio ebligas tajpi la akcentojn laborante per multaj mal-samaj programoj de via komputilo. Due, vi devas alporti la tekston en la tekstprilaborilon. Poste vi povas ŝangi la "cx" en "c" uzante la funkcion "anstataŭigi" de la tekst-prilaborilo. En la fenestro de anstataŭigfunkcio, skribu sur la unua linio la leteron sen akcento (cx) kaj sur la dua, post alklakado sur ikono de EK, vi skribu ĉ. Kiam vi elektas "ĉion anstataŭigi", ĉiuj viaj cx iĝas ĉ. Poste, vi devos ankoraŭ samfari por ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, aŭ, eŭ. Nun via teksto estas bone legebla.

Eble vi jam trovas, ke tio estas multe tro malfacila. Do mi havas alian ideon por vi. Luj tekstoj estas troveblaj tuj preseblaj, en formato PDF, kiel fabeloj sur la paĝo : <http://www.omnibus.se/fabelaro/>



Tekstoj de Franz Kafka, tradukitaj de Vilhelmo Lutermano.

<http://miresperanto.narod.ru/esp.htm> : Listo de multaj esperantaj tekstoj de rusa retpaĝo. (Tekstoj por infanoj estas ĉi-tie : http://miresperanto.narod.ru/por_infanoj.htm)

Ĉar mi scias, ke kelkaj esperantistoj ŝatas tian temon, mi povas indiki tiun retpaĝon kun erotikaj tekstoj : <http://www.esperanto-praha.net/erakontoj.htm>

Por tiuj, kiuj volas lerni pli da gramatikaĵoj, vi povas iri ĉi-tie : <http://bertilow.com/pmeg/>. Estas la plena manlibro de esperanta gramatiko de Bertilo Wennergren. Por aliaj, kiuj tre ŝatas la stilon de Claude Piron, vi povas trovi kelkajn librojn ("Dankon, Amiko !" kaj "Vere aŭ fantazie") de li sur lia retpaĝo : <http://claudepiron.free.fr/livres.htm>

Mi ĵus malkovris ion alian : tekstojn legitajn, kiujn oni povas simple aŭskulti. Vi trovos ilin ĉi-tie : <http://www.esperanto.org/literaturo/RealAudio/>

Tiel multe da tekstoj estas troveblaj, ke mi certas, ke vi rapide trovos trezorojn, kiujn mi mem neniam trovis ! Sufiĉe por pluraj blankaj noktoj...

Daniel Schöni Bartoli



Bedaŭrinde multaj aliaj libroj ne estas preseblaj kiel tiuj : <http://esperantujo.org/eLibrejo/> Tamen estas interesaj kaj grandaj elektindaĵoj : vi trovos "Pipi ŝtrumpolonga" de Astrid Lindgren, "Gulivero en Liliputo", multajn diversajn tradiciajn fabelojn, "Don Kiĥoto", kaj ankaŭ originalajn esperantistajn tekstojn. La plejmultajn rettekstojn vi devos tamen kopii, kiel mi klarigis antaŭe, en vian tekstprilaborilon.

Mi devas nepre ankoraŭ prezenti al vi ĉi tiujn paĝojn : <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/literaturo.html> Sur ili estas tiel multaj tekstoj, ke mi certas, ke vi trovos tre bonajn aferojn. Bedaŭrinde ne ĉiuj tekstoj estas kompletaj : kelkfoje estas nur recenzoj aŭ eliraĵoj. Tamen estas la ĉefa literatura esperanta retpaĝo.

Kelkajn aliajn retadresojn mi povas ankoraŭ nun konsili :

<http://www.gutenberg.org/browse/languages/eo.html.utf8.gz> : La projekto Gutenberg : Interesa listo de senpagaj libroj.

<http://esperanto.utopia.com.br/eta/> : "La eta princo" de Saint-Exupéry kun ĝiaj desegnoj.

<http://hjem.get2net.dk/chenero/hca/index3.html> : Fabeloj de Andersen.

<http://digilander.libero.it/nicolaruggiero/index2.html> : "Pinokjo" de Collodi.

<http://vlutermano.free.fr/kafka.html> :